
# la Espero

1990:1 SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

# KONGRESA CELO: KUBO



# KAJ PLI FRUE: KARLSKOGA

# NEKROLOGOJ

## Karl-Olof Sandgren

Post longa malsano mortis Karl-Olof Sandgren, fervora esperantisto kaj kristano, fondinto de Esperanto-Misio, kiun li prizorgis ĝismorte.

**Leif Nordenstorm**

## Fritz Ström, Kumla

avled den 29 november 1989. Ström blev esperantist redan 1927 och var en av initiativtagarna till bildandet av Kumla Esperantoförening 1930. Under hela hans livstid var esperanto hans stora intresse. Han lyssnade dagligen på esperantoutsändningar från flera utländska radiostationer och skrev rapporter till bl a polska radion. Vid besök av utländska esperantister tjänstgjorde Ström som värd. Under en följd av år var han ordförande i Kumla Esperantoförening och deltog i flera världskongresser, senast i Stockholm 1980.

U.R.


**Prov-ekzempleroj de revuoj el 1988**

*Ni volas disdoni ekzemplerojn de revuoj, kiujn ni ricevis dum pasinta jaro al kluboj kaj studgrupoj. Vi povas ricevi miksitajn provnumerojn el 1988 kaj ankaŭ provnumerojn de* El Popola Ĉinio *el pli fruaj jaroj. Vi povas elekti pakaĵojn de 3 kg (40 kr), 5 kg (50 kr) aŭ 7 kg (60 kr). Skribu al Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, antaŭ la fino de majo 1990!*



# *La Espero*

## *Organ för Svenska Esperantoförbundet*

**Adress:** EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08–11 74 34
**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm
**Redaktör:** Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920–279 78
**Sättning:** Per Aarne Fritzon och Leif Nordenstorm
**Utformning:** Franko Luin/Omnibus
**Tryck:** EsperantoCentro, Stockholm 1990


# Esperantoförbundet

**Adress:** EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08 –11 74 34
**Öppettider:** Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl. 11 – 13 och 17.30 – 19.
**Postgiro:** 20 12–3, Esperantoförbundet
**Medlemsavgift 1990:** Direktansluten medlem 125 kr. Familjemedlem (utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 50 kr.
**Enbart prenumeration:** 125 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 65 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.
Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

# SEFs styrelse

**Ordförande:** Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589–155 31 (Nordiskt samarbete)
**Vice ordförande:** Märtha Andréasson, Tolsered Pl. 2265, 425 90 Hisings Kärra, tel. 031–57 11 33 (Årskongresser, ekonomifrågor)
**Sekreterare:** Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08–712 82 91 (kansliet, massmedier)
**Kassör:** Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500–122 05 (massmedier)
**Styrelseledamot:** Kerstin Rohdin, Fack 142, 579 00 Högsby, tel. 0491–204 61 (turnéer, bibliotek)
**Styrelseledamot:** Bertil Andreasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby, tel. 0415–501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)
**Styrelseledamot:** Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011–17 36 87 (intern.org.)
**Suppleant:** Per Aarne Fritzon, Möregatan 9, II, 116 27 Stockholm, tel. 08 – 40 88 92
**Suppleant:** Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920–279 78

# Esperantoförlaget

**Postadress:** Box 7502, 200 42 Malmö
**Besöksadress:** Möllevångsgatan 20B, Malmö
**Telefon:** 040–12 20 29
**Postgiro:** 578–5
**Öppettider:** 1 september – 15 maj: onsdagar 10 – 11, torsdagar 17 – 18. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.
**Expedition:** Wivi Nilsson
**Styrelsens ordförande:** Tomas Jansson.

ISSN 0014-0694
FEBRUARO 1990
78-A JARKOLEKTO
FONDITA EN 1913

# la Espero

## Enhavo

2 *Nekrologoj*
3 *UN-temo por 1990: Batalo kontraŭ analfabeteco*
4 *Bonvenon al Karlskoga*
5 *Kongresaj kotizoj kaj prezoj*
6 *Provizora programo*
6 *Novaj kontaktoj kun Estonio*
7 *Bona rido plilongigas la vivon*
8 *La tria Kultura Esperanto-Festivalo okazos en Västerås*
9 *SEJU-paĝo*
10 *POR KOMENCANTOJ*
*Donacoj*
11 *Populara muziko*
12 *TRA LA LANDO*
*Esperanto i radio och teve*
*Flyktingar i Valdemarsvik*
*Bonaj rezultoj*
*Freinet-lärare*
12 *5:e internationella esperantokursen i Kungälv*
13 *Multaj libro-novaĵoj el Ĉinio*
13 *TRA LA MONDO*
*Alkoholismo*
*Amnestio Internacia*
*Ekologistoj*
*Agado E³ plu agadas*
14 *KALENDARO*
15 *Deziras korespondi*

## Prezidanto:

# UN-temo por 1990: Batalo kontraŭ analfabeteco

La analfabetoj plimultiĝis. Pli ol 100 milionoj da triamondaj infanoj en la aĝoj 6–11-jaraj ne vizitadas lernejon. Inter la pli aĝaj, 12–17 jaroj, la situacio estas eĉ pli terura. Proksimume 185 milionoj ne partoprenas en instruado – kaj oni supozas, ke la nombro kreskos.

Ankaŭ inter plenkreskuloj estas malbona situacio; 890 milionoj ne scias legi kaj skribi, kaj preskaŭ ĉiuj (870 milionoj) loĝas en neevoluintaj landoj. La raporto, el kiu mi prenis la ciferojn, ankaŭ montras la kunligon inter la nombro de legsciuloj kaj la nivelo de enspezoj po enloĝanto. La riĉaj neevoluintaj landoj atingas legscipovon de 85 % por viroj kaj 70 % por virinoj, sed en la plej neevoluintaj landoj la procentoj estas 47 % respektive 27 %. (La statistikoj estas por 1985, sed la situacio ne multe ŝanĝiĝis.)

Kelkaj landoj jam faris imponan kontribuon kontraŭ analfabeteco kaj dum relative mallonga tempo malpligrandigis aŭ eĉ forigis ĝin – sed tio estas speciale en la riĉaj neevoluintaj landoj. La konkludo estas, ke mankas mono, aŭ oni ne konsideras la problemojn sufiĉe gravaj!

Mi prenis tiujn ĉi informojn el la libro "Läget i världen 1988–1989" (La stato de la mondo 1988–1989), eldonita de la sveda UN-asocio. Ĝi enhavas 15 UN-raportojn kaj kostas 50 kronojn. Mendebla ĉe Svenska FN-förbundet, Box 151 15, 104 65 Stockholm.

La raporto ne informas, kiamaniere UN dum la analfabetiga jaro plibonigos la situacion por tiuj homoj, kiuj ne scias legi kaj skribi.

### Laborplano por 1990–91

Dum la estrarkunsido en novembro ni ellaboris agadplanon por du jaroj. Ankaŭ nun ni trovis, ke la plej gravaj taskoj estas:

- Instrui Esperanton
- Informi pri Esperanto al ĉiuj eksteraj instancoj
- Plifortigi la klubojn kaj plinombrigi la membraron

Speciale la lasta tasko estas grava. La kluba laboro – kaj la laboro de unuopaj membroj – estas necesa por nia pluvivo. La SEF-estraro ne povas atingi tiujn celgrupojn, kiujn la kluboj prilaboru

- instruante Esperanton surloke
- informante la lokajn parlamentanojn
- havante kontaktojn kun la lokaj organizoj
- partoprenante foirojn kaj ekspoziciojn...

Tiu laboro devas okazi sur loka nivelo. Kaj ni multe diskutis, kiamaniere plifortigi malfortajn klubojn kaj eĉ starigi novajn.


### Membrovarba konkurso

Koncerne la lastan taskon pri plinombrigo de la membraro, ni jam anoncis al la kluboj pri membrovarba konkurso dum 1990 inter la kluboj. Tiu klubo, kiu havigos la plej multajn novajn membrojn dum la jaro, ricevos 1000 kronojn. La dua premio estas 500 kronoj kaj la tria 250 kronoj. Ekstra premio je 500 kronoj iros al tiu klubo, kiu havigos

*(al paĝo 10)*

# Bonvenon al Karlskoga!

Karlskoga Popola Altlernejo kaj ĉiuj esperantistoj de Karlskoga bonvensalutas vin al la jarkongreso de SEF de la 18-a ĝis la 20-a de majo 1990. Estas la dua kongreso en nia urbo – la unua okazis en 1944.



## La Popola Altlernejo

En la Esperantofako de la lernejo oni studas Esperanton en klaso minimume 20 horojn semajne. Ĉiu semestro komenciĝas per komencanta kurso, kiun sekvas kurso por progresantoj. Ambaŭ kursoj estas oksemajnaj. La gelernantoj ankaŭ havas eblecojn elekti aliajn temojn, ekz. ceramikon, teksadon, muzikon, bazan komputadon ktp. Oni loĝas en modernaj, unulitaj ĉambroj (kun duŝo kaj necesejo) kun komunaj kuirejeto kaj televida ĉambro.

Ĉiun kurson partoprenas proksimume 10 gelernantoj. Ili venas el diversaj regionoj de la lando. Estas promesplene, ke multaj gejunuloj venas ĉi tien post la gimnazio, kaj estas esperplene, ke multaj partoprenintoj jam mem instruas Esperanton hejmloke. La fakto, ke la lingvo estas instruata en lerneja fako kaj estas uzata inter la gekursanoj kaj vizitantoj, estas ankaŭ tre bona reklamo, ĉar la lernejon vizitas ĉiusemajne multaj grandaj kursoj de la tuta lando kaj ili ekscias, ke la lingvo fakte funkcias.

Ni havas ankaŭ somerajn kursojn dum unu semajno en julio. Proksimume 50 personoj vizitas nin. En- kaj eksterlandaj instruistoj gvidas la tri aŭ kvar grupojn diversnivele.

La Popola altlernejo ĉiam estis pionira – jam en 1882 startis kursoj praktikaj por junuloj, baldaŭ estis invititaj junulinoj (kunedukado tiam estis preskaŭ neebla penso), kaj sekvis diversaj metiaj kursoj, sed oni ankaŭ tre frue kuraĝis starti kurson por senlaboruloj. Frue la lernejo enkondukis nivelgrupitajn studojn anstataŭ tradiciaj klasstudoj kaj vesperajn studrondojn por la loĝantoj de la urbo. En 1988 oni modernpense kaj kiel unua lernejo en Svedio enkondukis la Esperantofakon.

La Sveda Misia Federacio estras la lernejon kaj apogas la laboron por Esperanto.

Sur deklivo najbare de la lernejo situas la hejmregiona muzeo. Tie vi eniras tute alian mondon kun pano en la plafono, kuirforno por lignohejtado, krankogramofono kaj multaj interesaj objektoj kaj iloj el malnova tempo. Nia kongresejo bele kuŝas apud la lago Möckeln kaj aloga naturo proksimume du kilometrojn for de la centro de la urbo.

## La urbo

Karlskoga situas en la provinco Värmland kaj havas 35.000 loĝantojn. La plej granda dunganto de la Karlskoga estas la diversaj entreprenoj de la "Nobel-Industrioj", kiujn kompletigas multaj mezgrandaj kaj negrandaj industrioj en diversaj branĉoj.

La nomo de Alfred Nobel firme asociiĝas kun Karlskoga. Inter liaj inventoj ni trovas la unuan boaton aluminian, la raketfotilon, dinamiton, artsilkon kaj artefaritan ledon. Al Karlskoga Alfred Nobel venis en 1894, kiam li aĉetis la fabrikon Bofors – hodiaŭ ĝi estas la plej granda industrio de la regiono kun ĉ. 8.000 dungitoj.

Ĉe la urba placo troviĝas moderna aĉetcentro, biblioteko (kun valoraj Esperanto-libroj) kaj la restoracio Alfred Nobel, kie okazos la granda bankedo vespere la 19-an de majo.

Rekte kontraŭ la Arthalo en la centro de la urbo troviĝas la 400-jara preĝejo de Karlskoga. La interno belas, sed ankaŭ la eksteraĵo. Vizitantaj eksterlandanoj ĉiam ekŝatas la belan preĝejon, kies muroj estas kovritaj en alloga maniero per etaj, ruĝaj lignopecoj.

Apud la vojo E 18, ankaŭ en la centro, estas konstruita flora miniaturo de la preĝejo de 1586, la jaro kiam duko Karlo, poste reĝo Karlo la 9-a, fondis la lokon kaj nomis ĝin "Karls skogar" (la arbaroj de Karlo).

En Gråbo, survoje al la urbo

Nora, vi trovas tri diversajn loĝejojn de la jaroj 1885, 1918 kaj 1942. La muzeo situas en regiono kun ruĝe farbitaj domoj kun blankaj anguloj. Tie loĝis la laboristoj de la uzino.

La naturo ĉiam estas proksima, ankaŭ en la centro abundas floroj kaj verdaĵo. Sur la arbokovrita Rävåskullen meze de la urbo estas multaj vojetoj por promenado. Antaŭ multaj jaroj la cirkestrino Baptista Schreiber havis sian vintran kampejon tie, kaj ankoraŭ oni povas trovi la tombon de ŝia plej favorata ĉevalo.

Dek kilometrojn norde de Karlskoga situas bele renovigita altfornejo de Granbergsdal. Je 15 kilometroj nordokcidente de la urbo troviĝas Lunedet, vere plenaera paradizo por vizitantoj. La kampara vendejo denove malfermis siajn pordojn en unu el la skorîŝtonaj domoj. La loka forĝisto forĝas kaj artistoj de la komunumo kompletigas la bildon per siaj produktoj en propra laborejo. La akvo frue ebligis erc- kaj fertransportojn. Nuntempe la Bergslagskanalo estas ŝatata akvovojo por kanotoj kaj boatoj. En Lunedet estas unu el la tri kluzoj survoje al Filipstad, 50 kilometrojn for de Karlskoga. La eta preĝejo kuŝas centre, kun granda fenestro anstataŭ altarpentraĵo. Trae vi povas rigardi belan herbejon, kie paŝtiĝas bovinoj malproksime de la lago – vere paradiza vidaĵo!

Karlskoga havas bonan situon en Svedio. Ĝi situas 250 kilometrojn de Stokholmo kaj Gotenburgo, same proksime al la montaro kiel al la okcidenta marbordo. Per trajno vi vojaĝu ĝis Degerfors, prenu la ĉiam atendantan aŭtobuson al Karlskoga. La ŝoforo scias kie vi devas eliri por promeni la lastajn 500 metrojn al la lernejo. La lernejo situas du kilometrojn sude de la centro de Karlskoga laŭ la vojo al Degerfors. Troviĝas ŝildoj ĉe la vojo.

Bonvenon al Karlskoga, al la Popola Altlernejo kaj la SEF-kongreso 1990.

**Lars Forsman**

# Kongresaj kotizoj kaj prezoj

| **Kongresaj kotizoj:** | | **Prezo** | **Kodo** |
|---|---|---|---|
| Pago ĝis | 31/3 | 125:– | A |
| Pago post | 31/3 | 150:– | B |
| SEJU-membroj ĝis | 31/3 | 50:– | C |
| SEJU-membroj post | 31/3 | 75:– | D |
| **Kongresa pakaĵo en dulita ĉambro** | | | |
| Inkluzivas manĝojn, kafon kaj loĝadon | | 540:– | E |
| Aldono por unulita ĉambro | | 150:– | F |
| **Apartaj prezoj: Manĝo** | | | |
| Kafo je alveno kun buterpano | 18/5 | 20:– | G |
| Vespermanĝo | 18/5 | 37:– | H |
| Matenmanĝo | 19/5 | 25:– | I |
| Kafo antaŭtagmeza | 19/5 | 18:– | J |
| Lunĉo | 19/5 | 40:– | K |
| Kafo posttagmeza | 19/5 | 18:– | L |
| Matenmaĝo | 20/5 | 25:– | M |
| Lunĉo | 20/5 | 40:– | N |
| Supeo (ekskluzive trinkaĵojn) | 19/5 | ––– | O |

(La komunumo regalos nin ĝis 150 partoprenantoj. Se ni estos pli multaj, ni devos iom pagi.)

**Bonvolu sciigi nin, se vi deziras vegetaran manĝon!**

| **Apartaj prezoj: Loĝado** | | |
|---|---|---|
| Dulita ĉambro po nokto kaj persono | 150:– | P |
| Unulita ĉambro po nokto kaj persono | 225:– | Q |
| Matraco surplanke en ĉambro | 50:– | R |
| Junulargastejo po nokto kaj persono | 100:– | S |
| Amasloĝejo por gejunuloj en gimnastikejo | 25:– | T |
| Infanoj aĝaj 0 ĝis 4 | senkoste | U |
| Infanoj aĝaj 4 ĝis 12 | ½preze | V |
| Vizito en Nobelmuzeo | 20:– | X |
| **Kongresaj glumarkoj** | | |
| 5 markoj | 10:– | Y |
| 20 markoj | 35:– | Z |
| 50markoj | 75:– | Å |

Pagu al la konto n-ro **481 43 95 – 2, SEF-jarkongreso** kaj indiku la kodojn de la diversaj eroj, por kiuj vi pagas. Vi ricevos la biletojn je via alveno. **Aliĝu antaŭ la 30a de aprilo.**

**OPINIO**

# Novaj kontaktoj kun Estonio

Antaŭ la dua mondmilito du najbaraj landoj ĉe la Balta maro, Estonio kaj Svedio, havis bonajn kontaktojn. Ankaŭ esperantistoj de ambaŭ landoj havis tiutempe oftajn kontaktojn, oni faris reciprokajn vizitojn, interŝanĝis spertojn, partoprenis aranĝojn ktp. Post la dua mondmilito, kiam en Sovetunio Esperanto-movado preskaŭ mankis, rompiĝis la kontaktoj. En la lastaj jaroj en Estonio denove vekiĝas Esperanto-movado al nova vivo. Ni refondis memstaran Esperanto-Asocion de Estonio, aperas esperantlingva gazeto, ni dissendas radielsendojn, aktive ni instruas en lernejoj kaj rondoj la internacian lingvon. Hodiaŭ ni denove renovigas ankaŭ kontaktojn kun UEA, kun Esperanto-organizaĵoj de aliaj landoj, precipe de najbaraj landoj. Por tiu celo ni proponis al Sveda Esperanto-Federacio akcepti reprezentanton de Esperanto-Asocio de Estonio. Laŭ la interkonsento mi povis viziti vian landon. Dum tri semajnoj okazis multaj renkontiĝoj en kluboj kaj en lernejoj. Al mi tre plaĉis ankaŭ renkontiĝoj kun ne-esperantistoj, ŝajnas al mi, ke tio estas tre bona rimedo reklami pri nia movado. Mi pensas, ke estas multaj homoj, kiuj volos poste lerni la lingvon. Pro tio mi rakontis ne nur pri la Esperanto-movado en Estonio, sed ankaŭ pri aktualaj ekonomiaj kaj politikaj eventoj en nia lando.

Mi volas esprimi grandan dankon al la Sveda Esperanto-Federacio, al ĉiuj kluboj kaj al ĉiuj esperantistoj pro afabla kaj kortuŝa akcepto. Mi vidis en via lando interesan agadon, bonan volon al kunlaboro. Mi tre ĝojas, ke estas tiel granda intereso pri Estonio kaj pri nia Esperanto-movado. Mi povis renkontiĝi ankaŭ kun la prezidanto kaj estraranoj de via organizaĵo kaj ni konsentis, ke vi vizitos Estonion jam komence de 1990 por diskuti pli detale kun nia estraro pri estonta kunlaboro. Ni jam parolis, ke ni povus reciproke interŝanĝi turismajn grupojn, artistojn, vendi en niaj libroservoj niajn librojn. Multaj svedaj esperantistoj estis pretaj partopreni niajn tendarojn, tagojn pri naturo kaj scienco, junularajn

---

### *Provizora programo por la sveda Esperanto-kongreso en Karlskoga Popola Altlernejo 18-a ĝis 20-a de majo 1990*

## Vendredon la 18-an de majo

| | |
|---|---|
| 16.00 | La akceptejo ekdeĵoras |
| 16.00 – 18.45 | Jarkonferenco de la sveda sekcio de KELI |
| 19.00 | Interkona vespero; vespermanĝo kaj distraĵo |

## Sabaton la 19-an de majo

| | |
|---|---|
| 07.45 – 08.45 | Matenmanĝo |
| 08.30 – 10.00 | Jarkunvenoj de svedaj sekcioj de ILEI, IFEF kaj KELI |
| 08.30 – 10.00 | Regionaj respondeculoj diskutas pri venonta laboro |
| 09.30 | Jarkunveno de SEJU |
| 10.00 | Jarkunveno de Eldona Societo Esperanto |
| 10.30 – 11.45 | Jarkunveno de la sveda sekcio de KELI (daŭrigo) |
| 12.00 – 13.00 | Lunĉo |
| 13.00 | Solena malfermo de la kongreso |
| 14.00 | Jarkunveno de SEF |
| 16.30 | Jarkunveno de Sveda Esperanto-Instituto (por elektitaj reprezentantoj) |
| 16.30 | Kafo |
| 17.15 | Osmo Buller, ĝenerala sekretario de UEA, prelegas pri la taskoj de UEA |
| 19.00 | Sveda sekcio de KELI: raportoj, diskuto, laborgrupoj, kongresa raporto |
| 19.30 | Supeo en la restoracio Alfred Nobel |

## Dimanĉon la 20-an de majo

| | |
|---|---|
| 07.45 – 08.30 | Matenmanĝo |
| 08.20 – 09.00 | Diservo |
| 09.15 – 10.45 | Osmo Buller konsilas pri bona Esperanto-informado |
| 11.00 – 12.00 | Aŭkcio |
| 12.15 – 12.45 | Fermo de la kongreso |
| 12.45 – 13.45 | Lunĉo |
| 14.00 – 15.00 | Vizito en la Nobelmuzeo |

tendarojn. Estonaj esperantistoj volas partopreni viajn jarkongresojn. Ni parolis, ke estus interese aranĝi komunajn perfektigajn kursojn por instruistoj, unu parto de tia kurso povus esti en Estonio, la alia en Svedio. Ni povus aranĝi komunajn koncertojn, ekspoziciojn ktp.

Ni havas ĝemelajn urbojn: Tallinn kaj Malmö, Pärnu kaj Oskarshamn. En tiaj urboj estas aktivaj homoj, kiuj certe volus aktive kunlabori. Ni diskutu ankaŭ pri tio. En niaj landoj estas interesaj altlernejoj, kie agadas esperantistaj studentoj, kial do ne havi bonan kunlaboron inter studentoj! En Estonio en universitata urbo Tartu estas Esperanto-societo, kiu havas interesan historion kaj hodiaŭ aranĝas interesajn konferencojn, konkursojn, kunvenojn. Aktive laboras ankaŭ Esperanto-klubo ĉe Teknika universitato en Tallinn. Ni ambaŭ havas en niaj landoj diversajn eblecojn por interesa kaj multflanka kunlaboro. Bonvenon al Tallinn!

**Ahto Kaljusaar**
vicprezidanto de Esperanto-Asocio de Estonio

# Bona rido plilongigas la vivon

Dum busvojaĝo kun la preĝeja asocio subite okazas trapiko de la rado. La busŝoforo diras: "Nun ni devas kunlabori. Karlsson prenu la levilon, Persson tenu la rezervradon kaj la pastro iru ekster aŭdeblecon."

❖❖❖ ❖❖❖ ❖❖❖

– Kial vi ne ridas pri la humuraĵoj de la ĉefo?
– Mi finos en tiu ĉi laborejo morgaŭ.

❖❖❖ ❖❖❖ ❖❖❖

– Diru al mi, d-ro Jansson, ĉu mi diris ion maldecan dum la narkozo?
– Ne, absolute ne, sed vi vendis vian aŭton al mi por 100 kronoj.

**Ivar Nilsson**

# Dags att prenumerera!

**Prenumerera på en eller flera Esperantotidningar, så får du veta vad som händer i Esperantovärlden och tränar samtidigt språket. Priserna gäller för 1990.**

| | |
|---|---|
| *Bulgara Esperantisto* | *105 kr* |
| *El Popola Ĉinio* | *90 kr* |
| *El Popola Ĉinio, 2 år* | *150 kr* |
| *El Popola Ĉinio, 3 år* | *210 kr* |
| *Fokuso* | *95 kr* |
| *Fonto* | *110 kr* |
| *Heroldo* (*flygposttillägg 20 kr*) | *135 kr* |
| *Hungara Vivo* | *75 kr* |
| *ICEM Esperanto (Freinet-pedagogik)* | *85 kr* |
| *Juna Amiko* | *30 kr* |
| *La Kancerkliniko* | *110 kr* |
| *Kontakto* | *80 kr* |
| *Kulturaj Kajeroj* | *75 kr* |
| *La Espero el Koreio* | *60 kr* |
| *La Jaro (årskalender)* (*flygposttillägg 10 kr*) | *25 kr* |
| *Literatura Foiro* | *165 kr* |
| *Monato* (*flygposttillägg 45 kr*) | *195 kr* |
| *Norvega Esperantisto* | *55 kr* |
| *Oomoto* | *60 kr* |
| *Paco* | *60 kr* |
| *TEJO-Tutmonde* | *55 kr* |
| *Scienca Revuo* | *90 kr* |
| *UN kaj ni* | *50 kr* |

**En liten trevlig barntidning, *Infana Klubo*, utges i Danmark. Prenumerationsavgiften är 10 kronor, men till detta kommer porto, så avgiften blir:**

| | |
|---|---|
| *1 prenumeration* | *45 kr* |
| *2-4 till samma adress* | *20 kr/styck* |
| *5-9 till samma adress* | *17 kr/styck* |

**En ny sovjetisk tidning, *La Ondo*, kommer 1990. Den kommer att innehålla sociala och politiska faktaartiklar såväl som skönlitterära inslag.**

| | |
|---|---|
| *Prenumerationspris* | *60 kr* |

**Du beställer genom att sätta in pengar på pg 14 74 29–5, Svenska Esperantoförbundet, specialkonto, Hörby. Skriv bara på talongen vilken tidning du avser. Förfrågningar angående tidningsprenumerationer kan göras hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52.**

KEF 3

# La tria Kultura Esperanto-Festivalo okazos en Västerås



KEF – Kultura Esperanto-Festivalo – estas jam konata tradicia aranĝo. La unua KEF okazis en Upsalo en 1986, KEF 2 en Lund1988, kaj KEF 3 okazos en Västerås 24–27 de majo 1990. KEF estas festivalo de la originala esperanta kulturo. La jamaj KEF-oj enhavis muzikon, teatron, poezion, prelegojn kaj debatojn pri kulturo. La tria KEF verŝajne havos ĉion ĉi kaj ankaŭ aliajn kulturkampojn, kiel filmo, literaturo ktp. Laŭdire kelkaj imagas, ke KEF ĉefe okupiĝas pri rokmuziko, sed tiel ne estas. Ja prezentiĝis en KEF kelkaj el la rokgrupoj de Esperantujo, sed la ĉefa parto de KEF estis aliaj aferoj ol rokmuziko, ekz. teatro kaj kanzonoj. Kvankam la organizantoj de KEF estas plejparte junuloj, KEF sin direktas al ĉiuaĝaj esperantistoj.

KEF laboras laŭ iom aliaj principoj ol multaj aliaj kulturaj Esperanto-aranĝoj. Por la KEF-organizantoj plej gravas, ke la prezentotaj aferoj estu vere esperantaj. Ni tial invitas nur kontribuontojn, kiuj efektive scias la lingvon (kaj evitas t.n. "papagojn", kiuj nur elbuŝigas parkerigitajn tekstojn, kiujn ili mem ne komprenas), kaj ni preferas materialon originale esperantan.

Inter la kontribuintoj, kiuj jam aperis en KEF, ni povas mencii la teatrogrupon *La Krizalido*, la kanzonistojn *Ĝan Franko*, *Nikolin'* kaj *Georgo Handzlik*, la rokgrupojn *Persone* kaj *Amplifiki*, kaj la poeton *Jarlo Martelmonto*. Kiuj kontribuontoj venos al KEF 3 ankoraŭ ne estas klare, sed la programo povos ĉi-foje fariĝi eĉ pli ampleksa ol antaŭe pro la eksterordinare taŭga festivalejo *Bryggargården*, en kiu ni disponos pri du apartaj scenejoj, unu granda por teatro kaj spacopostula muziko, kaj unu malpli granda, en etosplena volbejo kun kameno, por prelegoj, diskutoj, recitaloj, poezio kaj eble filmo. Krome la festivalejo havas bonegan kafejon, kie eblos aŭskulti esperantan diskogurdon dum oni kafumas, manĝas kaj babilas. Simple mirinda ejo ĉe la plej belaj kaj malnovaj partoj de la urbo Västerås. Plej multaj festivalanoj loĝos en gimnastikejo tre proksime de Bryggargården, sed ankaŭ eblos mendi lokon en hotelo aŭ junulargastejo.

KEF estas aranĝata de kelkaj el la plej aktivaj membroj de SEJU kaj la stokholma klubo la Ranetoj, sed ĉi-foje kunaranĝas ankaŭ la Esperantoklubo de Västerås. La aranĝantoj jam havas multan sperton pri festivaloj, kaj KEF 3 verŝajne funkcios same glate kiel la antaŭaj. Plimalpli ĉiuj praktikaj detaloj estas nun pretaj, sed restas la du taskoj kontraktigi kontribuontojn kaj certigi la ekonomion. Se vi volas helpi al KEF, vi unuavice venu al Västerås 24–27 de majo 1990, sed vi povas ankaŭ subteni la festivalon per donacoj al la poŝtĝira konto **4888854-9, Kultura Esperanto-Festivalo**. Se vi scias pri taŭgaj artistoj aŭ alispecaj kontribuantoj al la programo, viaj proponoj estas ankaŭ tre bonvenaj.

Por kontakti la aranĝantojn de KEF 3 vi skribu al: Kultura Esperanto-Festivalo, Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm.

**Bertilo Wennergren**

# Medlemsavgift 1990

Nu är det dags att betala medlemsavgiften till Esperantoförbundet för 1990. Ni som är direktanslutna till förbundet betalar 125 kronor (ungdomar t o m 20 år och familjemedlem utan tidning: 50 kronor).

Betala till Esperantoförbundet, postgiro 20 12-3. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning Kvinpinto. Om du inte får den, meddela ditt födelseår på postgirotalongen.

Ni som är anslutna genom någon esperantoklubb betalar som vanligt till klubbens kassör. Till kassörerna kan vi meddela att de får betala 100 kr (ungdomar 35 kr, familjemedlemmar 35 kr) till SEF.

# Barn- och ungdomsträff i Karlskoga

Samtidigt med Svenska Esperanto-Förbundets kongress i vår kommer SEJU att arrangera en barn- och ungdomsträff. Tid och plats blir gemensam, d v s 18–20 maj på Karlskoga Folkhögskola.

Träffen blir en uppföljare till barnträffen i Östansjö i höstas, som drog 22 nöjda deltagare i åldrarna 8–14 år. Programmet blir förutom esperanto-undervisning även lekar, sånger, teater och pyssel. Lärare och ledare blir bl a Sven Jonsson (högstadielärare), Berit Posthuma (fritidspedagog), Inga Johansson och Beatrix Svenonius.

Alla barn och ungdomar från 8 år är välkomna och vi har inga krav på förkunskaper i esperanto. Någon övre åldersgräns har vi inte den här gången, eftersom SEJU (Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund) även har sitt årsmöte under helgen och vi hoppas att många medlemmar i alla åldrar kommer på det.

Logi blir på golvet i ett klassrum eller idrottshall, så ta med liggunderlag och sovsäck. De som åker med sina föräldrar kan ligga i extrasäng på deras rum. För priser och anmälan se information om SEF-kongressen.

Frågor besvaras av:

**Kajsa Larsson** 08/310876 eller
**Berit Posthuma** 0753/33928.


# TILL HAVANNA

Resa till esperantokongressen i Havanna, Kuba 14 – 21 juli 1990

***Till Havanna:***

| | | | |
|---|---|---|---|
| | 13 juli | 16.15 | Avgång Stockholm-Arlanda |
| | | 20.20 | Ankomst Moskva-Ŝeremetojvo |
| | 14 juli | 00.10 | Avgång Moskva-Ŝeremetojvo |
| | | 06.55 | Ankomst Havanna flygplats |

***Hemresa:***

| | | | |
|---|---|---|---|
| a. | 27 juli | 20.00 | Avgång Havanna flygplats |
| | 28 juli | 21.35 | Ankomst Moskva-Ŝeremetojvo* |
| | 29 juli | 11.05 | Avgång Moskva-Ŝeremetojvo |
| | | 11.10 | Ankomst Stockholm-Arlanda |
| b. | 2 augusti | 23.00 | Avgång Havanna flygplats |
| | 3 augusti | 22.25 | Ankomst Moskva-Ŝeremetojvo* |
| | 4 augusti | 11.05 | Avgång Moskva-Ŝeremetojvo |
| | | 11.10 | Ankomst Stockholm-Arlanda |

*) *Övernattning på Aeroflots hotell i Moskva ingår.*

Alla tider är lokala.

Nettopriset är **SEK 4 780** per person vid minst 10 personer (gruppris). Vid färre anmälningar gäller det individuela priset, som är SEK 5280 per person.

Beställ resan direkt hos

## SPECIAL TRAVEL

RESEBUREAU AB

Torsgatan 36, S-113 37 Stockholm, Tel. 08-31 26 35

Telex 14877 HAAKAN S, Postgiro 45 32 92-5, Bankgiro 509-8751


# Kallelse till årsmöte

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund kallar härmed sina medlemmar till årsmöte 1990. Årsmötet äger rum den 19:e maj 1990 i Karlskoga Folkhögskola i samband med Svenska Esperantoförbundets årskongress.

För SEJU:s styrelse

**Lena Månsson**, *ordförande*

# Nova adreso de Kastora Klubo

Kastora Klubo, pri kiu vi povis legi en La Espero 1989:6 havas novan adreson: Kastora Klubo, Pulawska 3-11, PL-00-515 Varsovio, Pollando. La klubo informas ke ĝi sendas senpage la kluban bultenon, al Esperanto-instruantoj, kiuj volas kunlabori kun la klubo.

# Kvinpinta Semajno

Kvinpinta semajno estas kunlabora projekto de junaj nordiaj esperantistoj, ĉefe por tiuj, kiuj ne povas iri al Internacia Junulara Kongreso en Kubo. Ĝi okazos en Finnlando 24-30 julio 1990. Petu pliajn informojn de: Riita Pulli, Kulkustie 3 B 14, SF-36240 KANGASALA, Finnlando.

**POR KOMENCANTOJ**

# Ne forĵetu gazetojn

En Svedio ni dum kelkaj jaroj kolektis paperon. Malnovajn gazetojn kaj reklamojn oni metas en konteneron (*container*). La konteneron oni transportas al fabriko, kiu re-uzas la paperon por fari novan paperon. Tio estas tre bona ideo.

Tamen ne estas bona ideo meti malnovajn esperantajn gazetojn en tian konteneron. En multaj landoj en Azio kaj Afriko ekzistas esperantistoj, kiuj ne povas aĉeti esperantajn gazetojn aŭ librojn. Ili volonte ricevos sendaĵon de vi. Eble vi ankaŭ havas kelkajn librojn, kiujn vi ne plu bezonas.

Ankaŭ en orienta Eŭropo ekzistas multaj esperantistoj, kiuj povas aĉeti esperantajn gazetojn kaj librojn el sia propra lando, sed ne el aliaj landoj. Ankaŭ ili bezonas gazetojn kaj librojn.

Baldaŭ estos la Semajno de Internacia Amikeco, la amikeca semajno de la esperanto-movado. Estas bona ideo sendi gazetojn kaj librojn nun. Tia-okaze ili al-venos en aŭ iom post tiu semajno.

Kie oni trovas adresojn de tiuj, kiuj bezonas legaĵon (*läsning*)? Se vi havas korespondanton (*brevvän*) vi povas sendi al li. En Revuo Esperanto kaj en aliaj internaciaj esperanto-revuoj, tiaj adresoj ofte aperas. Vi ankaŭ povas sendi legaĵon al UEA-delegitoj, kies adresojn vi trovos en la Jarlibro de UEA.

Ne sendu politikajn aŭ religiajn librojn aŭ gazetojn en landoj, kie estas politikaj aŭ religiaj persekutoj (*förföljelser*). Tio povus kaŭzi malfacilaĵojn por tiu, kiu ricevos la sendaĵon (*försändelse*).

**Leif Nordenstorm**

(*de paĝo 3*)

plej multajn novajn junularajn membrojn (malpli ol 30-jarajn). **Helpu vian klubon gajni!**

Estas ja tiel, ke organizoj kun multaj membroj, kaj precipe junaj membroj, pli facile ricevas ŝtatan apogon.

Nia celo (revo?) estas iam ricevi monan subvencion al salajrita kompetentulo, kiu povus plentempe okupiĝi pri nia laboro. Eble ni atingos tion, se ni ĉiuj vere streĉiĝas por havigi amase da novaj membroj.

Atentu, ke naŭ personoj en la SEF-estraro ne solaj povas influi la svedan popolon. **Via helpo estas necesa!**

**Karin Lindquist**

# Havanna 1990

Nu går det bra att anmäla sig till den internationella esperantokongressen i Havanna 14 – 21 juli 1990.

*Kongressavgiften i svenska kronor*

| | | Till 31/3 1990 | Från 1/4 1990 |
|---|---|---|---|
| 1 | Direkt medlem i UEA | 720 | 865 |
| 2 | Icke direkt medlem i UEA | 865 | 1000 |
| 3 | Medföljande/ handikappad eller ungdomar t o m 25 år som är direkta medlemmar i UEA | 430 | 575 |
| 4 | Medföljande/ handikappad eller ungdomar t o m 25 år som inte är direkta medlemmar i UEA | 575 | 720 |

Beställ anmälningsblankett hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel 0415-501 52. Blanketten skall sedan skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till postgiro 14 74 29-5 Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser.

# DONACOJ

**Klubo cent:** Ruben Enocson, Solna 100. Rolf Lagerström, Alingsås 100. Gustav Nygård, Göteborg, 100. Olle Olsson, Lund 100. Alingsås esperantoklubb 100.
**Memore al Erik Lundvall:** Falu-Borlänge Esperantoklubb 700.
**Memore al Fritz Ström:** Gunnar Ström, Julita 250. Sigurd och Margon Haaland, Kumla 50. Per Törnmark, Örebro, 100. Christina Bennermalm, Mora 200.
**Memore al Gösta Ljunggren:** Karin Lindquist, Arboga 100.
**Ĝenerale:** Sven Sundin, Växjö 16000. Claes-Göran Ingestedt, Vällingby 200. Allan Bengtsson, Varberg 25. Anonimulo 2000. Postlasaĵo de K E Nummelin, Bromma 1000. Gun Aronsson, Södertälje 50.

**SEF kore dankas pro la donacoj. Novaj donacoj estas bonvenaj al SEF, poŝtĝiro 20 12-3**

# Populara muziko

## Eltiraĵoj el verkata libro "Roko kaj popo"

Dumlonge ne ekzistis populara muziko en Esperanto, sed nun la situacio ŝanĝiĝis. Aperis bandoj kiel La Mondanoj, Team', Amplifiki, La Barbuloj ktp. Ne ĉiam temas pri profesinivela muziko, sed ja estas muziko de la internaciaj popularaj stiloj, kiuj regas la mondon ĉie. Ĉiuj aŭskultas tian ĉi muzikon, plej ofte en la Angla aŭ alia nacia lingvo, foje en Esperanto – sed kiu scias paroli pri ĝi en la Internacia? Io pli internacia ol rokmuziko apenaŭ ekzistas. Klare la Internacia Lingvo devas posedi la necesajn vortojn por priparoli ĝin.

Mia vortaro enhavas ĉirkaŭ 600 terminojn, kaj ĝi fakte ne limiĝas al la kampoj roko kaj popo, sed havas vortojn el ankaŭ aliaj muzikaj kampoj, kaj krome multajn teknikajn vortojn bezonatajn por la hodiaŭa teknike dominata muziko. Mi adoptis la artifikon difini muzikstilojn (kaj ankaŭ aliajn aferojn) ĉefe per nomoj de tipaj artistoj kaj muzikpecoj. Ĉi-artikole mi donos kelkajn ekzemplojn el la plena vortaro, kiu espereble iam aperos libroforme.

Mi elektis la anglan kiel traduklingvon, ĉar ĝi estas tiel superrega ĉi-kampe, sed por tiu ĉi eltiraĵo mi aldonis ankaŭ tradukojn en la svedan, kiam ĝi diferencas de la angla.

**Albumo** *album (record, casette or CD; skiva, kassett eller CD)*
Ĝenerala vorto por eldonita sonregistraĵo. Kiam nuntempe la sonverkoj ofte estas eldonataj en pluraj formoj (disko, kompakta disko, kasedo, DAT-kasedo) oni bezonas ĝeneralan vorton por la registraĵo mem, sendepende de la formo. Unu albumo povas eĉ konsisti el du (aŭ eĉ pli da) diskoj, kasedoj, k-diskoj ktp. Tion oni nomas duobla (triobla ktp) albumo. Disketojn kaj k-disketojn kun nur du–tri pecoj oni ne nomu albumoj.

**Amplifi** *to amplify, förstärka*
Plifortigi la sonon per tiucela elektra aparato – amplifilo.

**Bakango bakangomuziko** *mbaqanga*
Moderna populara muzikstilo en Sudafriko, influita de ritmenbluso, roko kaj regeo. *Soul Brothers; Steve Kekana; Paul Simon: Graceland.* Vd afro-, ĉimurengo, hajlajfo, ĵuĵuo, kvelao, makoso, sukuzo.

**Bando** *band*
Kunludantaro, ensemblo. Pli senceremonia vorto anstataŭ orkestro en ĵazo, roko kaj aliaj popularaj muzikstiloj. Bando estas almenaŭ iom organizita afero, ofte kun nomo, kontraste al la pli ĝeneralsenca vorto grupo, kiu ne bezonas esti tia.

**Basgitaro** *bass guitar, basgitarr, elbas*
Kvarkorda (malofte kvin- aŭ seskorda) gitaro. Normale elektra kaj sen resonanca skatolo. Ĝi enhavas la saman registron kiel basviolono.

**Bendomimado** *mime, lip sync, play back*
Kiam artisto(j) ŝajnigas kantadon kaj/aŭ ludadon, sed la vera sono venas de bendo aŭ simile. Vd bendakompanado.

**Blugraso, blugrasmuziko** *bluegrass*
Muzikstilo, kvazaŭ prakantrio, uzanta nur akustikajn instrumentojn, kiel banĝo, violono, mandolino, gitaro kaj dobro. *Blue Grass Boys; New Lost City Ramblers.*

**Bluso** *blues*
Muzikstilo kreita de la Usonaj negroj el kantoj laboraj, religiaj ktp. La ĉeftemo de bluso tradicie estas malĝojaĵoj. *Blind Lemon Jefferson; Bessie Smith.* Vd blusa harmoniko, blusa tono, blusroko, dekdumezura bluso, delta bluso, kampara bluso, ritmenbluso, urba bluso.

**Bugio, bugimuziko** *boogie(-woogie)*
Pianostilo en 8/8-takto kun refrasa baso kaj blusa akordostrukturo. *Jimmie Yancey; Fats Domino; Jerry Lee Lewis.* Vd ŝuflo.

**Cimbalo** *cymbal*
Perkutinstrumento. Ronda metalaplato ludata aŭ per ilo aŭ per alia cimbalo. Vd Ĉina, kraka, nita, plaŭda, sibla, sufoka, tinta cimbaloj, ĉarlestono, drumo.

**DAT-magnetofono** *DAT machine, DAT recorder, DAT-bandspelare*
Aparato por diĝite registri/ludi sonon sur specialaj kasedbendoj. Dum la sistemo de kompaktaj diskoj similas al gramofonoj, DAT-magnetofonoj similas al ordinaraj kasedmagnetofonoj. DAT = Digital Audio Tape – Diĝita Aŭdibenda Tekniko.

**Diĝita** *digital*
Disigita kaj kvantigita tiel, ke ĝiaj partoj estas priskribeblaj per ciferecaj valoroj (malo: analoga). Priskribas modernan teknikon uzatan ekz. en sonregistrado por ebligi plimalpli perfektan reprodukton. Vd sampli.

**Diskanto** *treble, diskant*
La pli alta parto de la tonspektro. Amplifiloj normale havas tembroregilon por la relativa laŭteco de la diskanto. Vd tembro, baso, mezo, ekvalizi.

**Diskestro** *disc jockey*
Tiu, kiu prizorgas la ludadon de diskoj (aŭ kasedoj ktp.) en diskoteko, radielsendo aŭ simile.

**Disko, gramofona disko** *(grammophone) record, disc, (grammofon)skiva*
Plastdisko kun sono storita en kanelo. Ludata per gramofono. Ekzistas du normalaj grandoj de gramofonaj

*(daŭrigo sur p. 16)*

## Esperanto i radio och teve

Esperantoförbundet fortsätter kontakterna med Utbildningsradion om en serie informationsprogram om esperanto. Det finns gott hopp om att serien kommer inom något år.

I TV 3 har esperanto redan fått uppmärksamhet. Det var Lars Forsman, esperantolärare i Karlskoga Folkhögskola som fick fram att esperanto kunde vara lösningen på EG:s språkproblem.

### Esperanto i närradio

Aktuella sändningstider och frekvenser är

*Radio Esperanto i Malmö*
tisdagar 10.30-11.00, 89,2 MHz
onsdagar 10.00-10.30, 89,2 MHz
torsdagar 17.30-18.00, 90,2 MHz

*Radio Esperanto i Uppsala*
söndagar 12.00-1300, 99 MHz

*Radio Esperanto i Västerås*
lördagar 16.20-16.30 92 MHz

*Radio Esperanto i Falköping*
onsdagar 6.45-7.00, 90,8 MHz
torsdagar 17.30-17.45, 90.8 MHz
dessutom esperantoinformation i bandslingan

## Flyktingar i Valdemarsvik

Man skulle kunna tänka sig att flyktingar har nog med att lära sig svenska. Men så är inte fallet. I Valdemarsvik har flyktingar vid förläggningen anmält sitt intresse för esperanto. De har påbörjat en korrespondenskurs från London.

## Bonaj rezultoj

Dank' al bona laboro de Lennert Svensson en Filipstad la loterio *Espero* 88 donis al SEF 47 493 kronojn. *Espero* 89 donos minimume 30000.

Dank'al subvencio la SEF-kongreso en Norrköping donis al SEF 10 502 kronojn.

## Freinet-lärare

Freinet-lärarnas esperantosektion samlas till kongress i Björkshult nära Fagerhult och Högsby i Småland den 1 – 11 augusti.

Alla esperantister, inte bara lärare, är välkomna. På förmiddagarna blir det esperantostudier på olika nivåer. På eftermiddagen och kvällen turism och internationellt umgänge. Här är det en vacker trakt av Småland med Kalmar och Öland inom räckhåll.

Kursavgiften är 150 kr (hälften för barn), rum och mat kostar 1600 kr (barn 1400), lägre pris för tältare och husvagnsboende.

Anmälan bör vara inne före 15 mars för garanti om plats. Anmälningsblankett kan fås från EsperantoCentro. Upplysningar också av Ingemar Nordin, tel 08-414637.

## Välkomna till 5:e internationella esperantokursen på Nordiska folkhögskolan i Kungälv, 11–15 juni 1990

***Tema för kursen:* Internationell kultur**

Undervisning på fem olika nivåer, samt en kurs för barn. Teater, föredrag med diskussioner, sång och dans, utflykter och kvällsprogram. Medverkande i programmet bl a:

*Andrzej Pettyn*, Warszawa
*Stefan MacGill*, Budapest
*Spomenka Stimec*, Zagreb som lärare, och
*Barbara Dluzynska*, Bialystok spelar teater, "Den lille prinsen".

Kostnad för hela kursen: **2 150:– kr**

Priset inkluderar mat och logi enbäddsrum, undervisning och hela programmet. Lägre dygnspris för äkta makar och speciella priser för barn. Lägre pris för dem som inte bor på skolan.

Upplysningar och anmälningsblanketter får ni av:
**Märtha Andréasson** 031/57 11 33, eller
**Marianne Nilsson** 0303/467 38

Vi vill påminna om att ni kan söka "Dagstudiestöd" (inkomst och/eller internatbidrag) hos Vuxenutbildningsnämnden på er ort. Slå upp i telefonkatalogen. **Obs! Ansökan om bidraget måste vara inlämnad senast 10 mars.**

### Internationell examen

Efter kursen har ni möjlighet att avlägga internationell examen. Bertil Andreasson, 0415/501 52, informerar och tar emot anmälningar.

**Nordiska folkhögskolan/Kungälvs Esperantoklubb**

# Multaj libro-novaĵoj el Ĉinio

## Kamelo Ŝjangzi

*Laŭ Ŝe, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1988, 319 p*

Laŭ Ŝe (Lao She, pseŭdonimo de Shi Qingchun, 1898-1967) estis unu el la ĉefaj prozistoj de la moderna ĉina literaturo. Kamelo Ŝjangzi (Luotuo Xiangzi, 1938) estas ĉefverko de la moderna ĉina romanistiko. ĈEL nun prezentis esperantan tradukon de ĝi, faritan de Ŭang Ĉongfang, ilustritan de Gaŭ Jongŝeng.

La romano rakontas la tragikan historion de juna rikiŝisto en Pekino de la 1930aj jaroj. Ni sekvas lian vivon en relativa prospero kaj en mizero. La medio do estas ekzotika por okcidentulo, sed la stilo de la romano estas sufiĉe simila al tiu de Dickens. Kelkaj similaĵoj sendube troviĝas: la vivoplena panoramo de urbega vivo, kaj la fakto ke la rakonto ĉefe ilustras moralan ideon. La diversaj roluloj de la rakonto grandparte devas ekzempli diversajn moralajn sintenojn, kaj sekve kelkfoje mankas al ili nuancoj. La lingvo de la traduko estas sufiĉe simpla, kvankam iomete nekonsekvenca pri verbotempoj.

**Sten Johansson**

## 5000 jaroj de Ĉinio

*Caŭ Bajlong, esperantigis Faibo, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1988, 388 p.*

Ĉinio havas longan kaj interesan historion. 5000 jaroj de Ĉinio priskribas tion kaj por fakuloj kaj por laikoj. La verkinto lerte kunigis kaj historiajn faktojn kaj amuzajn anekdotojn al libro kiu samtempe estas lernolibro kaj romano. La tekston kompletigas multaj desegnaĵoj. Tiun ĉi libron mi rekomendas al ĉiu kiu havas intereson pri Ĉinio.

LN

## Ĉinaj tradiciaj festoj

*Ĉji Ŝing, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1987, 124 p*

Ĉiu kiu legis ĉinan romanon aŭ *El Popola Ĉinio* iom konatiĝis kun ĉinaj festoj, kiel la novjara, la lanterna kaj la draka festoj. Por ili Ĉinaj Tradiciaj Festoj estas bona ebleco iom pli sisteme konatiĝi kun la tiuj kaj aliaj festoj., ne tre similaj al la niaj.

LN

## Tibeto sur la monda tegmento

*Kompilita de la Redakcio de EPĈ, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1987, 132 p.*

En tiu ĉi belega albumo kun koloraj fotoj sur ĉiu paĝo, la leganto povas konatiĝi kaj kun la antikva tibeta kulturo, kaj kun la moderna socio en la lando. La libro multe pli libere ol libroj eldonitaj dum la antaŭa jardeko traktas la tibetan budhismon kaj la katastrofan ruinigon de temploj, kiu okazis dum la "kultura revolucio".

La leganto tamen devas memori ke ĉinaj libroj tamen ĉiam defendas la "pacan liberigon" en 1951, kiun

*(daŭrigo sur venonta paĝo)*

# *Tra la mondo*

## Alkoholismo

Fondiĝis esperantlingva grupo de Alkoholuloj Anonimaj. Ĝi celas kunligi alkoholulajn esperantistojn el diversaj lokoj per korespondado, kunvenoj kaj la gazeto *La verda vito*. Interesitoj skribu al: Sobraj Verduloj, 204 N 39th Street, Seattle, WA 98103, Usono.

## Amnestio Internacia

Amnestio Internacia eldonis bazan informilon pri sia laboro en esperanto. Petu ĝin de: Amnestio Internacia, Internacia Sekretariato, 1 Easton St., London WC1X8DJ, Britio

## Ekologistoj

Fondiĝis nova asocio EKES (Ekologio kaj Esperanto), 38 rue Jean Moulin, F-33220 Sainte Foy la Grande, Francio.

## Agado E³ plu agadas

Agado E³, Esperantistoj Esperigas Esperantojn, agadas plu. Ĝi estas la propra help-organizaĵo de la esperanta movado, kies celo estas preventi nenecesan blindecon en la Tria mondo. Iam vitaminoj sufiĉas por tio. Adreso: Agado E³, Henegouwenlaan 35, NL-1966 RH Heemskerk, Nederlando.

ekzilaj tibetanoj ne nomas liberigon, sed okupadon. Ni tamen ne diskutos politikon en La Espero. Ĉiu povas mem legi, kaj mem elekti kion opinii.

LN

# Antikvaj Filozofoj de Ĉinio

*Hoŭ Ĝjŭeljang, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1988, 224 p*

Ĉinio neniam havis nur unu religion. Disvastiĝis konfuzianismo, taoismo kaj budhismo apud la popola religio. Filozofoj en ĉiu tempo disputis pri religio kaj politiko. Pro tio la religioj evoluis dum jarmiloj. Apud la religiaj filozofoj ekzistis materiismaj, kor-ismaj kaj aliaj.

La libro estas leginda por ĉiu, kiu interesiĝas pri la historio de Ĉinio. Ĝi estas grava ankaŭ por tiu, kiu volas kompreni nunan Ĉinion, ĉar la lando ankoraŭ balanciĝas inter *jin*-o kaj *jang*-o. Ĝi estas popular-science verkita.

**Leif Nordenstorm**

# Patrina koro

*Nevena Nedelĉeva, J Régulo, La Laguna 1975, 147 p*

Tiu ĉi libro fakte presiĝis en 1975, sed poste kuŝis en stokejo ĝis antaŭ unu jaro. En la antaŭparolo de la rakontaro, Asen Grigorov parolas pri la sentimentaleco kaj la romantikeco, kiuj nuancas la plejparton de la rakontoj. Tiuj du vortoj, sentimentaleco kaj romantikeco, estas bona priskribo pri la enhavo de la libro: mallongaj rakontoj pri travivaĵoj en la esperanta mondo, pri renkontiĝoj inter malsamlandanoj, pri amo, pri la fina venko...

Per la libro oni povas foruzi unu horon aŭ du, sed mi ne povas diri, ke mi ĝuis ĝin. La rakontoj ne meritis eldonon. Nur sentimentaleco kaj romantikeco ne sufiĉas.

**Leif Nordenstorm**

# Kalendaro

**MARTO**

12 mar – 11 maj **Daŭriga kurso**, Karlskoga (vidu la anoncon en La Espero 1989:4)

**APRILO**

13 – 16 **Paska renkontiĝo**, Vierhouten (Nederlanda Esperanta Junularo, Lilian van der Burgt, Postbus 528, NL-6200 AM MAASTRICHT, Nederlando)

13 – 20 **6a Printempa Semajno Internacia**, porfamilia aranĝo en Todtmoos, Sudokcidentgermanio (Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Strasse 2a, D-4418 NORDWALDE, FR Germanio)

14 – 17 **45-a kongreso de SAT-Amikaro** Bondy, Francio (SAT-Amikaro, 67 av. Gambetta, F-75020 PARIS, Francio)

21 – 22 **Esperantokurs, tre nivåer**, Estniska huset i Lund. Övernattning kan ordnas. (Ann-Christine Krondahl, Sjörupsvägen 102, Äsphult, 290 11 Linderöd, tel 044-32 51 64)

27 aprilo – 2 majo **Seminario: Esperanto-objekto de akademia intruado kaj esploro**, Bad Saarow, Berlin, GDR (Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Otto-Nuschke-Strasse 1, Berlin, Germana DR)

27 aprilo – 4 majo **Esperanta Semajno pri Sano kaj Resanigo**, Lingfield, Britio (Martin Howard, Webbs Cottage, Woolpits Road, Great Saling, Braintree, Essex CM 7 5DZ, Britio)

**MAJO**

2 – 9 **3-a Internacia Festivalo de Esperanto-Arto**, Volgograd, Sovetunio (Esperanto-EOLA, ab.ja. 73, u.Voljskij-30, SU-404130 Volgogradskaja obl., Sovetunio)

18 – 20 **Sveda esperantokongreso**, Karlskoga (Informoj sur paĝo 4)

18 – 20 **Barn och ungdomsträff**, Karlskoga (Information på sidan 9)

24 – 27 **3-a Kultura Esperanto-Festivalo**, Västerås (Informoj sur paĝo 8)

25 – 27 **5a Centra Renkontiĝo**, Brandenburg, GDR (Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Otto-Nuschke-Strasse 1, Berlin, Germana DR)

25 – 30 **3-a Internacia Akademia Konferenco Pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto**, Beijing, Ĉinio (Sciencist-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, 52 Sanlihe, 100864 BEIJING, Ĉinio)

**JUNIO**

1 – 5 **82a Franca Kongreso de Esperanto**, Blois (UFE, Kongresa Servo, 4 bis, Rue de la Cerisaie, F-75004 Parizo, Francio)

2 – 8 **Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio**, Hamar, Norvegio (IFEF-kongreso, Karudveg, N-2340 LØTEN, Norvegio)

4 – 10 **Esperanto-kurso por geskoltoj**, Kimito, Finnlando (Carola Antskog, Källkullen, SF-25700 KIMITO/KEMIÖ, Finnlando)

5 – 20 **Kurso de ĉina luktoarto taĝiĉuan** (Shenyang-a korpokultura instituto, 1 Han 1 Duan Taishanlu, Hungguqu, Shenyang, Ĉinio)

11 – 15 **5a Internacia kurso**, Nordiska folkhögskolan, Kungälv (anonco sur paĝo 12)

15 – 16 **Biciklado "Vätternrundan"**. (Esperantista teamo: Anita Bergh, Hasselgatan 60, 194 37 UPPLANDS VÄSBY, tel. 0760-858 72)

22 – 30 **3-a Internacia Esperantista Junulara Renkontiĝo** Arĥangelsk, Sovet-Unio (Fondaĵo de Esperantistaj Junularaj Aranĝoj, SU-103885 Moskva, prospekt Kalinina 14, Sovet-Unio)

**JULIO**

1 – 14 **Turisma rondvojaĝo** Kebekio kaj Ontario en Kanado (Esperanto-Societo Kebekia, C.P. 126, succ. Beaubien, Montréal, Québec, Kanado, H2G 3C8)

9 – 14 **Someraj kursoj**, Karlskoga (anonco en La Espero 1989:4, Karlskoga folkhögskola, Box 192, 691 24 Karlskoga, Tel: 0586-503 60)

21 – 28 **24-a ILEI-Konferenco** (instruista) Hanabanila, Kubo (Malcolm Jones, 41 Causeway, Chippenham, Wiltshire, Britio SN15 3DD)

14 – 21 **Universala Kongreso**, Havanna (anonco en La Espero 1989:4)

14 – 23 **23a Internacia Renkontiĝo Naturamika**, nybörjar- fortsättningskurser, turistarrangemang, Abaliget, Pécs (IREN, Departementa komitato de HEA, Hungara Esperanto-Asocio, PÉCS, Pf. 2. H-7601 Ungern)

16 – 23 **40-a KELI-Kongreso**, (kristana) Neuchâtel, Svisio (Kristana Esperantista Ligo Internacia, E. van Dijk-Kuypers, Koningsmantel 4, NL-2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando)

22 – 28 **Internacia Junulara Kongreso**, Kubo (Ŝanĝitaj datoj, informoj venos en La Espero)

23 – 29 **Kvinpinta Semajno**, Åbo/Turku (Riitta Pulli, Kulkustie 3 B 14, SF-36240 KANGSALA, Finnlando)

28 julio – 4 aŭgusto **Naturamika Feriosamajno**, Maria Alm, Aŭstrio (Max Finkenzeller, A-1100 Vieno, Troststrasse 27/10/12, Aŭstrio)

AŬGUSTO

1 – 11 **Kongreso de esperantistaj Freinet-instruistoj**, Björkshult, Småland (informo sur paĝo 12)

3 – 9 **Internacia Junulara Semajno**, Szödliget, Hungario (Lingvo-Studio, Szilvási László, H-1675 Budapest, Pf 87, Hungario)

4 – 11 **63-a SAT-Kongreso**, Linz, Aŭstrio (Max Hollinger, Gruberstrasse 65, A-4020 Linz, Aŭstrio)

6 – 18 **Tria intensiva pedagogia-metodika kurso**, UEA, ILEI, KCE (Kultura Centro Esperantista, Poŝtfako 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio)

11 – 18 **Internacia Feria Restado**, Vieno (Max Finkenzeller, A-1100 Vieno, Troststrasse 27/10/2, Aŭstrio)

24 – 30 **Turisma Semajno**, Malto (Esperanto-Societo Malta, P.O. Box 142, Valletta, Malto)

24 – 31 **61-a Itala Kongreso de Esperanto**, Padova (Gruppo Esperantista Padovano, Giovanni Saggiori, Via Barbieri, 18, I-35126 Padova, Italio)

SEPTEMBRO

1 **Esperantodagen** Upptakt för höstens aktiviteter för den svenska esperantorörelsen. Anordnas lokalt

1 – 10 SUS 7 (Scienca), Respubliko de San Marino (AIS, Kleinenberger Weg 16b, D-4790 Paderborn, FR Germanio)

16 – 24 SUS 8 (Scienca), Bialystok (AIS, Kleinenberger Weg 16b, D-4790 Paderborn, FR Germanio)

DECEMBRO

15 **La tago de la Esperanto-libro**

OFTE

**Vojaĝoj en Litovio:** Turisma kompanio Vejas, Gedimino pr 10/1, SU-232600 Vilnius, Litovio

**Vojaĝoj en Ĉinio:** Esperanto-Turisma Sekcio, Pekina Turisma Servo Tian'an, 8 Dong Zhi Men Nan Da Jie, 100027 PEIJING, Ĉinio

**Diversnivelaj kursoj:** Internacia Esperanto-Kursejo, BL-4744 SMOLJAN, p.k. 36

**Diversaj aranĝoj:** Grésillon (Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé, Francio)

**Vojaĝoj:** BET Esperantotur, str M Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando

# Deziras korespondi

*Nia nova asocio* serĉas kontaktojn kun "verduloj", kiuj okupiĝas por la naturo kaj pri naturprotektado: Zöldek Egyesulete, Kecskemet, Vadaskert, Martirok ut 1, H-6000, Hungario.

*20-jara studentino:* Carola Hannig, Straŝe des Aufbaus 18, DDR-7801 Lindenau/Post Ruhland, GDR

*21-jara polo,* kun intereso pri turismo, futbala, karateo, bokso kaj filmo: Adam Owczarek, Wechadlów 44, PL-28-412, Góry Pinczowskie, woj. Kieleckie, Polio.

*30-jara instruistino pri kemio:* Agata Zieba, PL-99-200 Poddebice, ul. Przejazd 16/9, Polio.

*40-jara instruistino pri matematiko:* Zofia Strus, PL-99-200 Poddebice, ul. Krasickiego 1/18, Polio.

*40-jara pola viro,* kiu havas familion, deziras korespondi pri ĝeneralaj temoj: Czeslaw Kosakowski, PL-05-230 Pobylka, ul. Ceramiczna 3, wojew. Warszawskie, Polio.

*Ljudmila Filatova,* 28-jara fraŭlino, okupiĝas pri Esperanto ekde 1987. Laboris kiel ekonomiistino kaj nun gvidas Esperanto-kursojn. Ŝi volus havi korespondamikojn el Svedujo. Adreso: Sovetio SU-121096, Moskva; ul. Kastanaevskaja 5-160.

*Konstantino Gaĥarija* volas korespondi kun kristanaj esperantistoj. Adreso: Sovetio SU-121019, Moskva, ul. Volĥonka, d. 13, Dom Kultury. Esperanto-Klubo.

*Raŝid Ĥanov estas 35-jara fraŭlo,* teknikisto de komputiloj, lernas anglan, araban lingvojn, interesiĝas pri diversaj religioj. Adreso: Sovetio SU-450098, Ufa, Rossijskaja 169-75. Telefono 35-01-13.

*Andreo Petrov estas 20-jara* kaj interesiĝas pri elektroniko, turismo, fotografio. Adreso: Sovetio, SU-453352, Kumertauskij r-n, v. Ermolaevo, ul Kalinina, d. 16, kv 3.

*Ekosona inĝeniero,* 27-jara slovako, deziras korespondajn rilatojn kun proksimume samaĝaj gesvedoj. Afable skribu al: Lŭdovít Ivan, Tyreŝova 6, CS-93401 Levice, Ĉeĥoslovakio.

Sten Svenonius
Erikstorpsgatan 26 A
21754 Malmö

Esperantoförbundet, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm

diskoj: Diskego (aŭ LP-disko), normale ludata je rapido de 33 turniĝoj minute kaj kun ĉ. 20 minutoj da sono sur ĉiu flanko, kaj disketo, normale ludata je 45 turniĝoj minute kaj kun nur kelkaj minutoj ĉiuflanke. Vd albumo, granda disketo, kompakta disko, kasedo, bendo, magnetofono, DAT-magnetofono.

**Diskoo, diskoa muziko** *disco (music)*
Speco de dancmuziko kreita origine por la diskotekoj. Nun oni pli ludas aliajn muzikstilojn ol diskoo en la diskotekoj. *Donna Summer; Boney M; Saturday Night Fever.*

Diskoteko *discotheque, diskotek*
1. Speco de dancejo, en kiu oni anstataŭ muzikistoj uzas gramofonojn, magnetofonojn aŭ simile. Vd diskestro, diskoo, granda disketo 2. (Evitindaj:) Diskokolekt(il)o, diskovendejo.

**Drumo** *drum set, drum kit, traps, trumset*
Speciala aro de perkutinstrumentoj ludata de unu muzikisto kaj konsistiganta unu instrumenton. Drumo enhavas baze bastamburon, rultamburon, ĉarlestonon kaj diversajn tamojn kaj cimbalojn. Oni distingu inter drumo kaj perkutinstrumentoj, ĉar multaj bandoj havas kaj drumiston kaj perkutinstrumentiston. Vd drumomaŝino.

**Eĥo, ekoo** *echo, eko*
La fenomeno, ke sono reaŭdiĝas reĝetiĝante de iu surfaco. Eĥo (aŭ ekoo) estas en muzikregistrado multe uzata efekto kreata nature, per magnetofono, aŭ per eĥilo. Vd spacosono.


**Ek** *on, på*
Indiko sur la klavo, per kiu oni ŝaltas elektran aparaton. Vd for, kuru, eligu, iru, paŭzu, rekuru, stop.

*(daŭrigota)*


# AŬSKULTU ESPERANTON

**en radio el deko da landoj, ĉiun semajnon – eĉ ĉiutage.**
**Petu la detalajn informojn pri ekskluziva nova sortimento de riceviloj. Atentu! Favoraj prezoj kaj, krome, konsiderinda samideana rabato.**

Hejma telefono al s-ano Arne A. 0322-144 27. *Teknikaj konsiloj* ankaŭ de Lennart Åberg, Gotenburgo. Tel. 031-48 95 97.



Radio-Centrum

**Kungsgatan 28, 441 30 ALINGÅS, Tel. 0322-132 95**